

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2010:1

Språket och kulturen - teman för årets Esperanto-kongress

Årets svenska esperanto-kongress i maj fokuserar på språk och kultur. Vi håller åter till i Esperanto-Gården i Lesjöfors, vår egen konferensanläggning.

Georgo Handzlik från Polen kommer dit för att spela teater: det blir en monolog som han själv skrivit och regisserat; Ludoviko - Lazaro. Föreställningen hade premiär under förra årets internationella esperantokongress i Bjalistok i Polen, där flera föreställningar drog "utsålda hus". Senare har han spelat sin pjäs i många länder i Europa och i Brasilien.

Georgo är utom författare och förläggare en välkänd och populär esperantolärare som många år undervisat på sommarkurserna i Karlskoga och i Lesjöfors. Många har också hört honom sjunga till gitarr på UEA:s internationella kongresser.

Från Flandern i Belgien kommer Kristin Tytgat. Hon arbetar som språklärare vid ett universitet i Bryssel och undervisar där tolkar och översättare för EU-systemet. Kristin berättar om hur orden inte alltid kan översättas enligt ordboken utan ordens betydelse har samband med respektive kultur. Hur blir det då bland esperantister, som



inte har en gemensam kulturell bakgrund?

Kristins andra föreläsning handlar om den nya gemensamma europeiska graderingen av språkkunskaper (Komuna Europa Referenc-kadro, KER) som också innefattar esperanto. I den nya typen av examen, som UEA stöder, kan nivån på kunskaper i esperanto jämföras med alla andra europeiska språk.

Det blir också möjlighet för den som vill att själv prova på den skriftliga delen av det nya examensprovet.

Före själva kongressdagarna gör vi en kultur- och naturresa i Värmland. Eller deltar i hemvändande lesjöforsares nöjen och äventyr.

Torsby herrgård. Ett av utflyktsmålen under kongressen

Foto: Munkfors kommun

Aliaj novaĵoj en tiu ĉi La Espero:

Tutpaĝa Esperanto-reklamo en Le Monde, paĝo 5

Esperantistoj instruos la romaan, paĝo 5

Teatra spektaklo: Ludoviko-Lazaro, paĝo 6

Aperos nova novelaro, paĝo 7

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Februaro 2010 • 98-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2010: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2010:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 754

26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

Stoppdatum Utkommer senast

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 30 september 31 oktober

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Kristin Tytgat



La Espero prezentos por vi Kristin Tytgat, kiu prelegos en Sveda Esperanto-kongreso en Lesjöfors.

Kristin TYTGAT (kiki) instruas la germanan, nederlandan kaj rusan lingvojn en la Erasmus-Instituto por Tradukistoj kaj Interpretistoj en Bruselo. La instituto estas parto de la Libera Universitato de Bruselo.

Ŝi spertiĝis pri interkulturaj rilatoj en kelkaj instrufakoj en la universitato. Ankaŭ la multjara organizado de universitataj interŝanĝoprogramoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo donis

al ŝi multe da valoraj spertoj de interhoma komunikado.

Kiel esperantistino ŝi ĉefe aktivis dum sia studenta tempo per funkcioj en la belga junulara movado, per la kunorganizado de la UK kaj IJK en 1982 en Belgio kaj per instruado de la lingvo.

Ŝi aparte interesiĝas pri multlingveco kaj faris staĝon en la Komisiono de EU pri la temo en 1980. Jam tiam ŝi ekzamenis la eblecojn de la uzo de Esperanto ene de la institucioj. Ekde tiam ŝi sekvas la diskuton de multlingveco en la institucioj de EU kaj en la membroŝtatoj.

La nuna defio en ŝia Esperantovivo estas la kunlaboro en la ekzamenoj de la Komuna Referenckadro de lingvoj kaj la preparo de projektoj en EU-kadro rilate al la instruado de Esperanto al plenkreskuloj.

Kiki loĝas en Antverpeno kun sia rusa edzo kaj havas aron da Esperanto-familianoj.

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Dankon al Kaisa kaj al multaj aliaj

Mia Januaro estis iom ĥaosa. Mi translokiĝis kun mia familio de Boden al Upsalo. Mi denove konsciigis ke mi havas tre multe da libroj - eble tro multe da libroj. Mi tamen ŝatas librojn, do - kion fari?

Ĵus antaŭ la translokiĝo paneis mia komputilo. Do, mi devis komenci fari La Esperon per alia komputilo, kaj mi perdis kelkajn tiparojn kaj aliajn aferojn, kiujn mi kutimas uzi. Tial tiu ĉi numero de la revuo aspektas iom alie.

Tamen, dank' al multaj samideanoj La Espero aperos.

Olof sendis pli bonan version de la tiparo. Anita, Ulla kaj Bengt sendis materialon pri la

kongreso. Sten permesis al mi publikigi eseon pri noveloj. Anita, Ann-Louise kaj Ulla helpis pri korektlegado.

Carl-Erik prizorgas la presadon kaj dissendas la revuon.

Helpas ankaŭ multaj aliaj diversmaniere.

Ĉi-foje mi volas danki aparte al Kaisa, kiu dum multaj jaroj prizorgis la membreregistraron de Sveda Esperanto-Federacio, kaj kiu faris etikedojn por la dissendado de la revuo.

Kaj se iu sendis ion al mi, kiu ne aperis, bv. skribu al mi denove. Mi translokiĝis kaj ankoraŭ estas malordo en mia hejmo.

Leif Nordenstorm
Via redaktoro

SVEDA ESPERANTO-KONGRESO



Jarkongreso Lesjöfors, (12-)-14-16 majo 2010

Merkredo 12 majo 2010, antaŭkongresa programo

Alveno posttagmeze por viziti lokajn aranĝojn de la jaŭdo. Komuna vespermanĝo.

Ĵaŭdo 13 majo 2010, antaŭkongresa programo
Dumtage: Partopreno en lokaj aranĝoj de la tradicia urbeto "reven-vizita tago"

19.00 Vespermanĝo

20.00 Prezento de la vidindaĵoj de la vendreda ekskurso, Anita Dagmarsdotter

Vendredo 14 majo 2010, antaŭkongresa programo, kaj unuaj jarkongresaj programeroj

09.00 Ekveturo por tuttaga ekskurso laŭ aliĝoj (reveno je vespermanĝo)

Posttagm. Kafo por tiuj kiuj alvenas

Ĉ. 18.00 Vespermanĝo (horo dependas de alveno de la ekskurso)

19.00 Kunveno Sveda Esperanto-Instituto

20.00 Amika kunestado

Sabato 15 majo 2010

09.00 Jarkunveno Eldona Societo Esperanto

10.00 Kafo

10.30 "Unu lingvo, malsamaj kulturoj", prelego de Kristin Tytgat

12.00 Lunĉo

13.00 Jarkunveno Sveda Esperanto-Federacio

14.30 Kafo

15.00 Enkonduko al sistemo de ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro. Parto 1, kun ekzemplo/provo de ekzameno, gvidos: Kristin Tytgat

16.15-17.15 Jarkunveno sveda sekcio ILEI.se

18.00 Vespermanĝo

20.00 Teatro-prezento "Ludoviko-Lazaro" de Georgo Handzlik

Dimanĉo 16 majo 2010

09.00 Diservo

09.30 Jarkunveno Sveda sekcio de KELI

10.00 Kafo

10.30 Enkonduko al sistemo de ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro. Partoj 2 kaj 3

12.30 Fino de la jarkongreso

13.00-14.00 Lunĉo

Anemona Renkontiĝo de SEJU: la Anemonoj mem preparos siajn manĝojn aparte, kaj estas bonvenaj al la programeroj de la jarkongreso. sefkongr2010@esperanto.se, 08-7128291

Anmälän till årskongress (12-)-14-16 maj 2010, Esperanto-Gården i Lesjöfors

Kongresspaketet fredag-söndag innehåller logi i flerbäddrum med sänglinne (toalett och dusch i korridoren), mat och kongressavgift, för ankomst fredag eftermiddag 14 maj, avresa söndag eftermiddag 16 maj.

- Kostar 1.300 kr per person.

Lägg till: Utflykt fredagen, och ankomst torsdagen

Heldagsutflykt fredagen 14 maj, inkl lunch och inträden, start fredagen kl 09.00

- Kostar 750 kr per person

Övernattning i flerbäddrum natten torsdag 13 maj, ankomst em, mat torsdagkvällen, frukost fredagen

- Kostar 400 kr per person

Lägg till: Uppleva Lesjöfors "hemvändardag" torsdagen, med ankomst onsdagen

Övernattning i flerbäddrum natten onsdag 12 maj, ankomst em, mat onsdagkvällen, frukost lunchmatsäck torsdagen

- Kostar 450 kr per person

Lägg eventuellt också till:

Plats i dubbelrum, med namngiven rumskamrat, tillägget gäller för de två-fyra nätterna sammanlagt

- Kostar tillägg för de två-fyra nätterna sammanlagt: 300 kr per person.

Tillägg på kongressavgiften

Anmälan senare än 15 april: tillägg 100 kr

Deltagare som inte är medlem i Svenska Esperantoförbundet: tillägg 100 kr

Anmälningsdatum

Anmäl dig före 15 april. Därefter höjs kongressavgiften med 100 kr.

Avbeställning

Logi, mat och utflykt kan avbeställas fram till 30 april. Kongressavgiften (300 kr), som ingår i kongresspaketet, återbetalas inte.

Andra önskemål – kontakta kongresskommittén:

- Övernatta i egen husvagn, med tillgång till toalett och dusch i Esperanto-Gården, och el-uttag för husvagnen?

- Barnfamilj?

- Bosatt i utlandet eller inbjuden gäst bosatt i utlandet (medlem i UEA): betalar inte kongressavgiften på 300 kr

- Enkelrum?

- Stanna fler dagar?

- Ungdom under 20 år?

- Vegetarian, vegan, allergiker?

- Deltagare i SEJU-mötet "Anemona Renkontiĝo"?

- Rådgivning om resväg?

Hur man anmäler sig:

Betala in kongresspaketet och eventuella tillägg till pg 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn (föreningen bistår kongresskommittén med administrationen).

Skriv namn, adress, telefon, ev epost-adress på talongen, anteckna ankomstdag och eventuella önskemål om rum och mat. Om du gör internet-betalning, skriv brev eller mejl om önskemålen till Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 13542 Tyresö,

sefkongr2010@esperanto.se, 08-7128291 (kassör i Esperantoföreningen Södertörn).

Genom skog och dal

Utflykten vid årskongressen blir ett smakprov av värmländsk kultur och historia. Kulturen representeras av Nordens mest kände akvarellist Lars Lerin genom hans bilder och böcker, av bruksmiljön på Laxholmen i Munkfors och av Finnkultur-centrum i Torsby. Historia finns på samma ställen och dessutom anknytning till historier genom utsikt över Fryksdalen, den bygd som inspirerade Selma Lagerlöf.

Vi börjar resan från Lesjöfors strax efter frukost. Efter ett par timmar väntar kaffet på Torby herrgård, innan vi blir lotsade genom Torsby Finnkulturcentrums utställning där. På herrgården finns ett museum, bibliotek och arkiv om skogsfinnsk kultur. Utställningen visar finnskogens särdrag, t.ex. byggnader, näverflätning, jakt, fiske, trolldom, språk och musik.

Skogsfinnarna kom från det dåtida Östra Sverige, dagens Finland, till Sverige under 15- och 1600-talet och spred sig från östkusten tvärs över skandinaviska halvön. De svenska gränstrakterna mot Norge (Jämtland)

*Bild:
Finnkultur-
centrum I
Torsby*



*Lars Lerin: Björkskog II 2008 Foto Lars Edelholt
Munkfors bruks träddrageri har blivit utställningslokal för Lars Lerins omfattande konstnärskap. Från bilder i vykortformat till riktigt stora målningar fångslar betraktaren.*

Torsby herrgård välkomnar med fika och utställning om skogsfinnarna som bebyggde svenska gränstrakter och införde svedjebbruk. Bland ättlingarna finns Björn Skifs, Gunnar Myrdal, Dan Andersson, och Tage Erlander.

behövde befolkas och det erbjöds betydande skattelättnader. De kom med sin svedjetechnik och svedjeråg till de mellansvenska barrskogarna. I Värmland levde språk och kultur kvar länge, ända in i vår tid. Sägner och myter, namn, poesi och musik har blivit bevarade.

Längs Övre Frykens västra sida far vi söderut till Tossebergskläppen, som Selma Lagerlöf döpt till Gurlita klätt i Gösta Berlings saga. Det är ett hyperitberg på 343 m över havet och från berget har man en vid utsikt över Fryksdalen, Selmas landskap. Efter lunchbuffé på restaurang Kalebass, som drivs av Anki och maken Makhosi från Sydafrika, går resan vidare genom Sunne till Munkfors.

I det gamla träddrageriet på Laxholmen har Lars Lerins alster fått gott om utrymme. Utställningen presenterar bilder i olika tekniker från dagligt liv, från många resor bl a till Indien, Arktis, Antarktis och skotska öar. Den gamla bruksmiljön invid Klarälven tycks som ämnad just för det här ändamål. Till varje säsong kommer nytillskott.

Lars Lerin är född 1954 i Munkfors, målare och författare. Han har studerat vid Valandskonsthögskola i Göteborg bl a. Han har haft utställningar i alla

nordiska länder och några till. Vid utställning på Valdemarsudde i Stockholm sommaren 2008 drog hans måleri många besökare. Han har till nu gett ut 49 böcker med text och bild och blev hedersdoktor vid Karlstads universitet i höstas. Många har också sett och hört intervjuer i radio och TV, där han blivit uppmärksammas en del, speciellt under det sista året.

Motiven i Lars bilder är ofta landskapet - det värmländska, det karga kustlandskapet eller hus - på landet eller i någon stad i världen. Och nästan alltid är det folktomt. Med sin väna stämman förklarade Lars under en intervju att han tycker människor är svårt att måla och att han utelämnar alltid fötterna, för de är värst. Men att framställa det nordiska ljuset är han en mästare på.

Med dessa bilder på näthinnan bär det tillbaka till Lesjöfors och väntande middag.

Anita Dagmarsdotter



Anemona renkontiĝo

Same kiel pasintjare, SEJU kune kun la LKK de la SEF-a jarkongreso aranĝos la junularan eventon "Anemona Renkontiĝo". Ĝi okazos samloke kaj samtempe kun la jarkongreso de SEF, sed kun plejparte propra programo kaj propra manĝo. Se vi estas juna, korpe aŭ mense, ne hezitu veni kaj umi kun la aliaj anemonoj! Plia informo haveblas ĉe <http://tejo.org/seju>
Carl Mäsak
prezidanto de SEJU

TRA LA MONDO

Tutpaĝa Esperanto-reklamo en Le Monde

Etsuo Miyoshi estas fama japana esperantisto, prezidanto de sia prospera firmao Swany, kiu en la lastaj jaroj multe kaj signife kontribuis al diskonigo de Esperanto per financado de tutpaĝaj reklamoj de la plej legataj gazetoj en deko de eŭropaj landoj.

Lige al la 150-a jubileo de naskiĝdato de Zamenhof s-ro Etsuo Miyoshi denove subvenciis aperigon de tutpaĝa Esperanto-reklamo, ĉi-foje en la gazeto "Le Monde" en Francio.

Henri Masson

Karavano tra Rusio

Esperantistoj en Rusio organizos E-karavanon per la transsiberia trajno al la 6a Azia E-Kongreso en Ulanbatoro (Mongolio) en junio 2010. Se interesas vin partopreni, vi povas kontakti la UEA-delegiton en Ivanovo, Rusio, Tatjana Loskutova lota49@mail.ru por pliaj informoj.

Provizora itinero, fotoj kaj rakontoj de antaŭaj karavanoj troviĝas en la hejmpaĝo "La Tuta Mongolio" www.mongolio.info.

Komputilo al Kubo

La prezidanto de Dana Esperanto-Asocio Ileana Schröder transdonis al mi mesaĝon de la prezidanto de Granam Esperanto-Filio en Kubo, Rafael Cabrera Espinosa. La mesaĝo interalie tekstas: "Ĉu vi kredas, ke danaj esperantistoj povas alporti malnovan kaj malgrandan komputilon por ni? Ĉar nia komputilo estas rompita kaj ni ne povas aĉeti novan ĉar en Kubo ĝi estas multe kosta."

Ĉu eble iu sveda esperantisto, kiu planas partopreni la UKn en Kubo povus donaci malnovan komputilon, kiun li/ŝi ne plu uzas?

La retpoŝtadreso de Rafaelo estas esperanto@crisol.cult.cu.

Pliaj informoj pri li, pri lia klubo kaj pri liaj ideoj estas legeblaj ĉe: <http://rosejo.blogspot.com/2009/08/esperanto-kiel-energiokaj-ne-kiel.html>

Ann-Louise

Esperantistoj instruos la romaan

La novan lernolibron pri la romaaj lingvoj kaj literaturo por gimnazianoj kaj mezlernejoj en Slovakio preparos anoj de la esperantista projekto E@I, nuntempe kutime deĉifrata "Edukado en Interreto". Same la novan lernolibron pri komputado por slovakiaj abiturientoj. Jam antaŭ duonjaro E@I ricevis grandan subvencion por prepari retejon kiu instruos la slovakon al eksterlandanoj, elirante el la spertoj de la Esperanta retejo Lernu.net.

www.liberafolio.org

LINGVO

Språkdag hela veckan

Förra årets upplaga av Europeiska språkdagen den 26 september hade formen av en tävling för ungdomar upp till 19 år. Tävligen gick ut på att med enkla medel, till exempel en mobiltelefon med filmkamera, spela in en minutlång film på temat *språken i mitt liv*. Tretton bidrag skickades in (och även en

del exempelfilmer utom tävlingen) och kan beskådas på sajten www.thelanguagesinmylife.se. Priset till skaparna av de tre vinnande bidragen var att delta i en workshop i digitalt berättande, arrangerad i samarbete med Kulturskolan.

Redan nu är planeringen av årets språkdag igång, och även i år deltar Esperantoförbundet som medarrangör. Förutom en tävling under liknande former, kommer även andra aktiviteter arrangeras av de medverkande organisationerna under själva språkdagen och den efterföljande veckan för att synliggöra språk och kultur.

Olof Pettersson



SEF-KONGRESSO

Reven-vizita tago 13 majo en Lesjöfors

Ĵaŭdo la 13 majo estos revenvizita tago en Lesjöfors. La urbeto bonvenigas loĝantojn kiuj ne plu loĝas tie, per aro da lokal aranĝoj. Esperantistoj kiuj alvenas pli frue por la sveda jarkongreso povas partopreni.

Jam matene okazos liberaera diservo apud la proksima preĝejo. Sportejo Stålvallen havos aron da aranĝoj. Por tiuj kiuj ŝatas promeni aŭ kuri oni aranĝas Lesjöforsjoggen je 8,5 km, kaj eblas simple ĝui la vojon aŭ vetkuri se oni tion preferas.

En la regiono, la speco de migrantaj vendistoj "knalle" estas konata, kaj en tiu tradicio oni aranĝas merkaton dum la tago, "knallemarknad".

En aliaj partoj de la urbeto okazos konkursoj kaj muzikaj prezentoj por infanoj. Oni nomos kaj celebros lokan premiindan eminentulon. La muzeo estos malfermita dum pli da horoj. Vespere estos danco en la kultura domo Folkets hus.

Ekster la lokaj aranĝoj estos ja ankaŭ ebleco simple fari promenon en la arbaro, ekzemple per la 3-kilometra vojeto kiu komenciĝas apud la muzeo. Majo estas bela monato en tiu ĉi parto de Svedio.

Ulla Luin

TEATRO

Ludoviko – Lazaro Monodrama spektaklo

En Sveda Esperanto-Kongreso en Lesjöfors ni ĝuos la dramon "Ludviko-Lazaro".

Tuta domo jam dormas, nur Ludoviko en sia kabineto, tradukas, rememoras, preparas medikamenton por ... tion vi ekscios dum la spektaklo. Sed antaŭ tio vi aŭdos fascinajn rakontojn pri Bjalistokaj jaroj, pri Varsovio kaj Moskvo. Vi ekscios kiel naskiĝis la unua vorto de Esperanto, kion oni malpermesis al aŭtoro de Esperanto dum la Bulonja Kongreso kaj kial li portis surduton. Mondmilito, memmortiĝo, tragedia amhisto-

monodrama spektaklo verkita speciale por Bjalistoka UK de Georgo Handzlik – La Bardo sen Barbo. Monda prapremiero dum la Universala Kongreso.

Aŭtoro: Georgo Handzlik
Reĝisoro: Kuba Abrahamowicz
Aktoras: Georgo Handzlik

La spektaklo estis jam prezentata dum:

- * 94-a Universala Kongreso, Bjalistoko, Pollando (kvar foje)
- * Arkones 2009, Poznano, Pollando
- * Ĉeĥa Esperanto Konferenco 2009, Svitavy, Ĉeĥio

Georgo Handzlik nin regalis per brile originala monodramo, kiun li prezentis per sia konata sprito kaj allogo, enplektante la publikon vive en la spektaklon.

Kongresa Kuriero de 94-a UK

Teatraĵe, elstaras la originala monodramo *Ludoviko-Lazaro*, kortuŝa historio de la plej fama bjalistokano. Sed ne pensu pri teda reprezento: danke al la artista lerto, vi estu certa ke vi ja amuziĝos ĝin spektante. Ekde la juneca periodo en la pola urbo, la verko alvenas ĝis la plej trafa sukceso de la internacia lingo.


Francesco Maurelli

Georgo Handzlik enŝovis sin en la haŭton de la jam maljuniĝinta Zamenhofo. La transformiĝinta bardo ankaŭ kiel scenisto sola kapablis tiri la atenton al si sursceneje dum horo kaj duono en kafejo Fama. Dum la prezentado de la monodrama spektaklo, la aktoro/Majstro rejuniĝis revenante al la estiĝo de la praa Esperanto en la junulaj jaroj, eĉ mem kantis kaj dancis: "Jam temp' está". En la sekvo li paŝon post paŝo remaljuniĝis laŭ la biografiaj eventoj. Neoficiale, en sia hejma sfero Zamenhofo distre, tamen pensinstige, foje instrue rememorigas siajn privatajn sentojn. La aktoro kunludigis la spektantojn per demandoj, alparoloj, dialogoj, laborigoj, eĉ trinkigis herbobrandon. La protagonisto ja estis kuracisto kaj bonfaranto... Zamenhofo ne ŝatis la titolon "Majstro". Sed ni rajtas nomi majstrojn la adapton de la Zamenhofa biografio al la scenejo, la homigon de la ĝenerale surpedestala Patro de Esperanto, la lertan lingvaĵon kaj la nuancoriĉan prezentadon fare de nur unu person(ec)o: Gratulon, Georgo Handzlik!

G. C. Fighiera

Monodrama spektaklo "Ludoviko-Lazaro", kies aŭtoro kaj aktoro estis Georgo Handzlik. La spektaklo ravis min kaj probable la tutan publikon, kiu tre atente sekvis rememorojn de maljuna kuracisto kaj longe aplaŭdis la aktoron.

Blago de Dorota



rio. Perditaj valizoj, spionaj kaj nespionaj pseŭdonimoj. Kaj en la maltrankvilaj jaroj la Homo, kiu malgraŭ prudento de la tuta mondo realigas sian knabetan revon. Vi mem juĝos, ĉu li estis polo, eble ruso aŭ... Kia li estis kuracisto kaj kia homo?. Ĉu ni similas al samtempuloj de Zamenhof? Kion instruis nin la dudeka jarcento? Renkontiĝu kun La Majstro dum la

- * GRUPE, Gliwice, Pollando
- * Zamenhofa Tago 2009 en Pola Ambasado de Brasilia, Brazilo
- * Jarfina Kunfratiĝa Tagmanĝo de Taguatinga Esperanto-Klubo 2009, Brazilo
- * JES, Junulara Esperanto Semajno, Zakopane 2010, Pollando

La Esperanta novelarto dum 120 jaroj

En 2010 aperos novelaro kun noveloj el la 2000-aj jaroj ĉe Eldona Societo Esperanto. Pro tio La Espero invitis Sten Johansson eseji pri Esperanta novelarto.

Kiel konate, la historio de la lingvo Esperanto estas intime ligita kun ties literaturo. Jam ekde la komenco, eĉ antaŭ la publikigo de sia lingvoprojekto, Zamenhof elprovis ĝin per poemoj originalaj kaj tradukitaj, kaj ankaŭ per tradukado de prozo.



La unua originala prozo aperis en 1891 aŭ 1892 en “La Esperantisto” eldonata en Nurembergo. Temis pri rakontoj verkita de la germano *Ludwig Emil Meier* kaj la ruso *Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko*. En 1896 “Lingvo Internacia” eldonata en Upsalo aranĝis literaturan konkurson, en kiu premiĝis novelo de la polo *Józef Wasniewski*.

Poemoj, noveloj kaj romanoj

La verkado kaj publikigado de noveloj kaj rakontoj en Esperanto do tre baldaŭ postsekvis la poezian kreadon, kaj ili multe antaŭis la romanojn. Tio estas natura afero; poemojn kaj mallongajn prozaĵojn oni povas publikigi en gazetoj, kaj ilia

verkado ne signifas tro grandan fortostreĉon. Ankaŭ en la plua evoluo de esperantlingva originala literaturo noveloj ludis gravan rolon, eble pli gravan ol en kelkaj naciaj literaturoj, kie ofte la romanoj estis ĉefa motoro de la moderna beletra evoluo. La Esperanta beletra evoluo estas amatora afero, kreata de amatoroj, eldonata de amatoroj, kaj ĝiaj revuoj – kulturaj kaj movadaj – pli facile atingebblas ol ĝiaj libroservoj. Krome, la legantoj ne ĉiam regas la lingvon tiel bone, kiel la meza leganto de nacilingvaj verkoj. Do, multaj cirkonstancoj pli favoras mallongan prozon ol ampleksajn, kelkcentpaĝajn verkojn.

Mi eĉ kuraĝus diri – kvankam tio ja estas aserto kontestebla – ke la Esperantaj noveloj ne nur kvante sed ankaŭ kvalite superas la romanojn. Kiel jam dirite, krei romanon estas granda fortostreĉo, sed krome necesas kapablo kaj talento por starigi bonan romankonstruon. En Esperantaj romanoj oni kelkfoje rimarkas, ke ĉio iras plimalpli glate preskaŭ ĝis la fino, sed tie la aŭtoro ne sukcesis pri sia tasko. Aŭ la fino estas tro stumpa, kvazaŭ la fortoj elĉerpiĝis, aŭ ĝi plenas de koincidoj kaj rompoj de la ĝistiam realismo, kvazaŭ la aŭtoro malesperis pri kiel finfine nodi ĉiujn fadenojn. Kompren-eble ankaŭ por verki bonan novelon necesas krea lerto, tamen oni pli facile supervidas kaj regas la verkon. Kaj en okazo de fiasko, ĉe novelo tio ne estas katastrofo – eblas simple komenci novan – dum fiaskinta romano povas kaŭzi aŭtoran traŭmaton.

La literaturo – kaj prozo kaj poezio – ĉiam estas kampo de formaj eksperimentoj. Tio validas pri la Esperanta beletra same kiel pri nacilingvaj. En Esperanto la eksperimentado

koncernas ĉefe la lingvon, dum ni ankoraŭ grandparte atendas niajn novigantojn, se temas pri la maniero rakonti. Esperanta *Joyce* ankoraŭ ne aperis, nek *Lobo Antunes*. La legantoj tamen ofte plendas pri tiu lingva eksperimentemo; multaj el ili preferus legi verkojn en “normala Esperanto”. Ŝajnas al mi, ke la lingva eksperimentado okazas pli ofte en romanoj ol en noveloj, kvankam kompreneble troviĝas ankaŭ ekzemploj de la malo.

Noveloj

Kio do estas novelo? Nu, evidente temas pri mallonga prozaĵo, kvankam ne facilas fiksi precizajn kvantajn limojn. Krom tio, tipa trajto estas la koncentriĝo je limigita temo, malmultaj aperantaj personoj, ne tro longa tempofluo. Ofte la eta formato signifas intensecon kaj densecon de la esprimrimedoj. Plej ofte temas pri prozo rakonta kaj sceniga, simile kiel en romano, tamen la denseco fojfoje donas al la stilo trajtojn certagrade lirikajn.

Oni ofte parolas pri du malsamaj tradicioj en la novelarto: Unue la tradicia epika novelo, en kiu gravas ĉefe la dramaj okazaĵoj kaj la klara fino, kiu rivelas aŭ konkludas ion, kelkfoje en maniero sprita. Due la pli moderna lirika novelo, kiu scenigas kaj prilumas la kondiĉojn kaj konfliktojn internajn kaj eksterajn de homoj, aŭ kiu prezentas kvazaŭ “tranĉaĵon el la vivo”, sed en kiu ne tiel gravas drama intrigo aŭ sprita fino. Iam oni mencias kiel korifeojn de la unua speco *Guy de Maupassant*, de la dua *Anton Ĉeĥov*. Kompren-eble, ĉe multaj verkoj oni trovas trajtojn de ambaŭ tradicioj.

Esperanta novelarto

La historio de la Esperanta novelarto do komenciĝis en la 1890-aj jaroj, maksimume kvin jarojn post la publika lanĉo de la lingvo. El fruaj novelistoj – krom la triopo preparolita komence – oni povas mencii *Ivan Genadjeviĉ Ŝirjaev* kaj *Julio Baghy*. Ili verkis plejparte novelojn de tradicia humanisma speco, eble eĉ romantikisma, kaj ĉe Baghy ofte kun granda porcio da humuro. Bona ekzemplo estas *Kiel Mihok instruis angle*, kie Baghy humure ekspluatas siajn spertojn de militkaptito en Siberio. Ambaŭ verkistoj havis gravan signifon por la evoluo kaj stabiliĝo de Esperanta proza lingvaĵo de internacia stilo, sen personaj aŭ naciaj specifajoj.

En la 1930-aj jaroj du britoj portis la Esperantan novelarton al nova ŝtupo. Temas pri *K.R.C. Sturmer* kaj *L.N.L. Newell*. Ili sufiĉe bone ekzemplas la du supre menciitajn noveltradiciojn, kun Newell kiel la “epika” kaj Sturmer kiel la “lirika” novelisto. Tre famas la novelo *Apud stacidomo Victoria* de Sturmer (sub pseŭdonimo *K. Robinson*).

Samtempe, sed ankaŭ poste en la jaroj 40-aj kaj 50-aj, *Raymond Schwartz* kaj *Ferenc Szilágyi*, aktiviz en pluraj ĝenroj, sed eble plej elstare sur la novela kampo. Schwartz estis prefere humoristo kaj Szilágyi psikologo, tamen ambaŭ esprimis profundan humanismon prezentatan per bela stilo.

Dum la dua mondmilito literaturo por la plimulto de esperantistoj ne estis unua prioritato, sed ankaŭ postmilito ĝi nur iom post iom reakiris gravecon. Literaturaj revuoj ja estis fonditaj – “Malgranda revuo”, “Norda Prismo”, “la nica literatura revuo” – aŭ refonditaj – “Literatura Mondo”. Tamen tiuj revuoj unu post la alia mortis, kaj la libroeldonado ne furoris. Se mencii kelkajn gravajn novelistojn de la jaroj 1960-aj kaj 70-aj, tiuj povus esti *Marjorie Boulton*, *John I. Francis*, *Johan Hammond Rosbach* kaj *Lina Gabrielli*. En la mezo de la 70-aj jaroj aperis *Endre Tóth*, kies sola novelaro *Lappar, la antikristo* tamen aperis nur postmorte en 1982. Tiu volumo estas eble la

plej valora verko iam ajn aperinta de la originala Esperanta novelarto, tamen ĝi ne vekis tre grandan atenton. Laŭ ĝia titola novelo, cetere, la filmisto *Adam Gluziński* faris premiitan filmon pollingvan.

En la 1980-aj jaroj la nombro de libroformaj novelaroj denove kreskis, kaj ĉefe dank’ al la literatura revuo “Fonto” aperinta de 1980 ĝis 2006, sed ankaŭ al “Literatura Foiro” aperanta de 1970 kaj al “Monato” aperanta de 1980, kreskis la ebloj publikigi kaj legi novelojn en la gazetaro. El novelistoj de la jaroj 80-aj kaj 90-aj oni povus mencii *Reto Rossetti*, *Spomenka Ŝtimec*, *Julian Modest (Georgi Mihalkov)*, *Karolo Piè*, *Julia Pióro*, *Sergo Elgo (Georges Lagrange)*, *Jorge Camacho*, *Lina Karpunina* kaj multaj aliaj. De du nacilingve profesiaj verkistoj, kiuj verkas ankaŭ Esperante, aperis krom romanoj ankaŭ novelaroj: *István Nemere* kaj *Manuel de Seabra*. El ĉi tiu periodo mi ŝatus atentigi pri unu novelo, kiu ne estas tre konata. La japana Esperanto-poeto *Masayuki Kuroda* en 1990 aperigis la romanon *Animo drivas*, kiu estas interesa sed preskaŭ nelegebla pro sia stranga lingvaĵo. Sed fine de la sama volumo oni trovas en normala lingvaĵo la novelon *Amburĝono*, kiu estas ege trafa, bone scenigita kaj tre leginda.

Antologioj

Je diversaj okazoj aperis antologioj, kiuj celis prezenti elekton el la tuta Esperanta novelarto, aŭ el iu specifa parto de ĝi.



Menciindas *33 rakontoj* aperinta en 1964 sub redaktado de Reto Rossetti kaj Ferenc


Szilágyi, kaj *Trezoro* aperinta en 1989 en du dikaj volumoj sub redaktado de Reto Rossetti kaj Henri Vatré.



En *Trezoro* aperis verkoj de 101 aŭtoroj, tamen ne nur noveloj, sed ankaŭ fragmentoj el romanoj. En 2001 aperis *Mondoj* kun 34 rakontoj plejparte novaj. Oni povus mencii ankaŭ kolektojn el noveloj aperintaj en *Monato (Tempo fuĝas, 1995)*, el noveloj “pri strangaj fenomenoj” (*La maŝino kiu kriis, 1995*), el noveloj humoraj kaj satiraj (*Vivo kaj morto de Wiederboren, 1998*), el noveloj sciencfikciaj (*Sferoj, pluraj volumoj de 1984 ĝis 2000*) kaj aliajn specialajn antologiojn.

Pri gravaj noveloj kaj novelistoj post la jaro 2000 efektive tro fruas multe paroli. Nur post pluraj jaroj oni povos vere prijuĝi la ĵusajn verkojn. Jen en via mano tamen troviĝas kolekto prezentanta kelkajn el la aŭtoroj, kiuj kontribuis al la Esperanta novelarto dum la unua jardeko de la tria jarmilo. Kelkaj el la aŭtoraj nomoj estas konataj jam de jaroj, aliaj eble konsistigas la proksiman estontecon de nia literaturo.

Sten Johansson



En 2010 aperos ĉe *Eldona Societo Esperanto* novelaro kun moderna Esperanta novelarto.